UNIVERSITY LIBRARY
... 1918
PRINCETON, N.J.

C.J.7.

# Amerika Esperantisto

MAY, 1918



Official Organ of
The Esperanto Association of North America

Digitized by Google

# AMERIKA ESPERANTISTO

**Official Organ**

**of**

**THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.**

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Rondo, meets Third Friday eve., Rm. 315 Lick Bldg., 35 Montgomery St. F-ino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Av.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo,—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Wednesday evenings. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Sec. & Treas., 436 15th St.

BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 8 P. M. R. Goodland, Sec.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P. M.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslov Sobehrad, Secy, 1116 W. 19th Place. La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg., Miss M. G. Ingalls, Sec'y, The Windsor, State St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P. M.

La Pola Esp. Unuiĝo, ĉiusemajne, Magnus Butzel Library, Harper & E. Grand Blvd. La Septentrio, Tues., 8.00 P. M., 578 Alexandrine Ave., W.

NEW YORK CITY, N. Y.

The Greater New York Esperanto Society, including all chartered clubs in Manhattan, The Bronx, Brooklyn, Queens, Richmond, Long Island, Westchester County and the New Jersey suburbs, C. C. Coigne, Secretary, 2633 Creston Avenue. Esperantists visiting New York should call Fordham 2749.

The New York Barĉo, or Esperanto supper, is held on The Third Friday of every month (7 P. M.), at the new headquarters of the Civic Club, 14 West 12th St. (two doors west of 5th Ave., south side); conveniently located to "L" and subway lines.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan. Germana Esperanto-Societo — activities suspended during the war.

PHILADELPHIA, PA.

Phila Esp. Soc., J. F. Knowlan, Sec., 45 No. 13th St. Meets 4th Fri., Windsor Cafe, 1217 Filbert St.

Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art James McKirdy, Sec., Box 920. Fridays, 8 P. M.

PLAINVIEW, NEBR.

Esperanto-Fako de la "Sola Skolto" (Lone Scout), 500 N. Dearborn, Chicago, Ill. (Revuo por la Junularo. Organizu grupojn inter la geknaboj. Granda sukceso. Abonu tuj! Jare .75; Kvarmonate .25.) Fakestro, Chas. P. Lang, Plainview, Nebr.

HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y, Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

Google Original from PRINCETON UNIVERSITY

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

**Published Monthly by**

**THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)**
**WEST NEWTON, MASS.**

**One Dollar a Year.** **Single Copy Ten Cents.**

**VOL. 22** **MAY, 1918** **NO. 4**

## A SUBSTANTIAL RECOGNITION OF ESPERANTO

The **League to Enforce Peace,** of which Ex-President William Howard Taft is president, has recently issued a pamphlet printed in Esperanto, setting forth the objects of the organization, and containing a translation of Mr. Taft's address at the founding of the League. This has been sent to prominent people in all the allied countries, thru the co-operation of the British and French Esperanto associations. Readers of **Amerika Esperantisto** who have not received a copy may obtain one by applying to the **League to Enforce Peace,** 70 Fifth Avenue, New York.

---

There has just come to our exchange desk a copy of the "Japan Salesman," an imposing looking publication printed in English and Spanish, devoted to the interests of trade in Japan. It contains, besides many advertisements of Japanese import and export houses, and short articles giving information of value to commercial houses, the following special articles: "The Match Industry of Japan" (illustrated), "Business Conditions in the Philippines," "How the War has affected Tin," "Professional Exporter is Real Trade Builder," "Glimpses of Japan's Commercial Development," "Facts About Central America," giving descriptive sketches of the principal Central American countries, "General Trade News," a resume of conditions as regards different commodities, an editorial on "One Common Language for the Merchants of the World," and an article on "The Language Question in Business," the two latter being very favorable to Esperanto, and intimating the probability that the magazine will in the near future establish an Esperanto department.

Digitized by Google Original from PRINCETON UNIVERSITY

THE JAPAN SALESMAN
51 Yamashitacho, Yokohama

Estimataj Sinjoroj:—

Kiel vi vidos en la ĵus al vi sendita numero de nia ĵurnalo ni decidis aperigi ĉiumonate Esperantan fakon, ĉar ni opinias ke Esperanto fariĝos tre baldaŭ la ĉefa komerca lingvo.

Por pruvi al nia legantaro ke Esperanto estas jam uzata en la tuta mondo ni intencas aperigi plenan adresaron de ĉiuj firmoj en la mondo, kiuj jam uzas la lingvon, kaj tial ni skribas al vi, por peti vin havigi al ni adresaron (nomon, adreson kaj negocon) de ĉiuj firmoj en via lando kiuj jam uzas aŭ povus uzi Esperanton (nome tiuj kiuj ankoraŭ ne uzas ĝin, sed havas komizojn, konantaj la lingvon). Ni estus ankaŭ tre dankemaj por ĉiaspecaj sciigoj pri Esperanto en komerco kaj pri registaraj agoj rilate al Esperanto.

por The Japan Salesman
R. H. Dick,
Redaktoro de Esperanta Fako.

---

## TWO GOOD SUGGESTIONS

New York City, June 28, 1918.

To the Secretary of the E.A.N.A.

Dear Sir:—

I believe this should be brought to the attention of the "kongresanoj" and club secretaries. The New York Society has received a surprising number of inquiries as a result of being listed in the 'phone book and during the last month four eksterlandaj samideanoj were able to locate the Esperanto movement in New York in this manner. Boston and Chicago will not need this suggestion, but there are other cities whose clubs could profit by it.

The word **Esperanto** should appear **first**, even if the club's name is Zamenhofa or Verda Stelo or the like. In the 'phone book such a name could appear

Esperanto, Verda Stelo Club, J. Smith, Sec., 44 Hope St. Main 1234.

Very cordially yours,
Creston C. Coigne.

Digitized by Google
Original from PRINCETON UNIVERSITY

New York City, July 15, 1918.

Editor of Amerika Esperantisto:—

Here is a propaganda idea based on human psychology.

Most humans like to receive money, and when they are receiving money they are likely to be kindly disposed toward the world in general and their debtor in particular. This is true not only of the "average" man, but very often of soulless corporations.

Therefore, fellow-thinkers, never miss an opportunity of "getting in" Esperanto when you pay your bills. Have some literature always handy and enclose a few leaflets or keys with your check to the gas company, the coal dealer, the electricity vendor, the grocer, the down-town (or uptown, for that matter) department store, the tailor, the local Ford agent, and (why not?) the City Hall when you pay your taxes.

If you are a real samideano you will not stop at the list enumerated above, but when you tip your waiter you will see that your jitney or two-bits is neatly poised in the center of a key; your street-car ticket will be handed to the conductor in the same manner, and so on through the line of subway gatemen, elevated guards, soda clerks, janitors, policemen, letter carriers, and before you reach the ninetieth floor of your office building not even the humble boot-black will have been neglected.

Why not try it out?

An Esperanto Fan.

———o———

The official replier-to-newspaper-articles is attending to his duties as usual—witness the following from the Brooklyn (N.Y.) Eagle.

## ITS ONE DRAWBACK

They say that Esperanto is
  A language that's beyond compare;
But one thing has been overlooked—
  In Esperanto one can't swear.
There does not seem the slightest doubt
  This language new will fall right there.

Will Esperanto ever do
  For him who gets up in the night
To marathon with a squalling kid
  Who kicks and squirms with all its might?
When he treads firmly on a tack,
  His English will come back all right.

Digitized by Google Original from PRINCETON UNIVERSITY

How will the chauffeur get along
  When, with a final wheeze and grunt,
His car gives out nine miles from home,
  Which is not an unheard-of stunt?
Will Esperanto be his choice
  Of languages? Indeed, it won't.

The ultimate consumer, too,
  Is one whom we must not forget.
When he finds that his coal is gone,
  And higher prices must be met,
Can Esperanto e'er suffice
  To voice his burning thoughts? Not yet.

---

## ESPERANTO POSSIBILITIES

### The Absence of "Swear Words" is Indignantly Denied

Editor Brooklyn Daily Eagle:

Will you kindly permit me a little space in your very valuable paper to relieve the anxiety of that anonymous sweet singer regarding Esperanto's alleged "Only Drawback"—its absence of swear words—which clever quip appeared in your issue of the 11th. I wish to warn him not to lend a willing ear to all the gross calumnies so indefatigably heaped upon Esperanto by her enemies in order to discredit her among our best citizens. If that very serious accusation had been based on facts, it would, indeed, have been a sufficient cause to bar Esperanto from our firesides as a most undesirable intruder, and have her bundled over to our immigration authorities for immediate deportation along with other undesirables so justly prescribed by our statutes and severely proscribed by social ethics.

But let this anonymous poet and fearless champion of public morals be assured by one who is in the know, that not only does Esperanto fully measure up in that essential as she does in all the others, but that, as a matter of fact, she even excels herself in this particular respect.

I can solemnly testify from my own experience, which is fully borne out by those of others, that in those certain grave moments in our lives when we become suddenly possessed of an irresistible desire to give vent to some of our most perfervid wishes—that Esperanto then comes to us as a delivering angel. I have had many an encounter with conductors, plumbers and tax collectors, and in all such vexatious emergencies I have found Esperanto a veritable balm of Gilead. And the strangest, and the most commendable, feature about swearing in Esperanto is,

Digitized by Google

that while the delivery is being made, and which invariably causes the adversary to take to his heels in confusion, the bystanders are always wondering whether they are hearing one of King David's dulcet songs or the reciting of the Lord's Prayer.

Now, as to those exceptionally distressing instances enumerated by the bashful genius, instances trying men's souls, I wish to state that they do not at all disconcert the Esperantist who knows his business. Although not a pater familias as yet—I am just sweet 66—I had once a most cantankerous screaming baby thrust into my arms by its mother, with the evident intention of deriving lots of fun at my expense. But the tables were instantly turned. Putting the small finger of my free hand under the baby's chin, I uttered in a soft voice these talismanic words: "Ne ploru, mia bona ĉarma infaneto!" and lo and behold, the baby's scream immediately turned into the sweetest little laugh, and, its face wreathed in smiles, it evinced an irresistible desire to show its affection toward me by tugging strenuously at my luxurious patriarchal whiskers.

Now, as to the query, What an Esperantist would do when his car gave out nine miles from home? I really cannot imagine anything happening to a car that any Esperantist could not fix in a jiffy. But, if what the poet had in mind, was the giving out of gasoline, then he is evidently not aware that there are no foolish virgins among Esperantists.

Joseph Silbernik.

---

(A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster at Boston, Mass., on September 10 as required by the Act of Oct. 3, 1917.)

---o---

## VAŜINGTONA ESPERANTISTA-VESPA PIKNIKO

Dimanĉon, la 25an aŭgusto la Esperantista grupo kiu kunvenas ĉiun ĵaŭdon vespere ĉe gesinjoroj Fosselman en Vaŝingtono festis jaran kampkunvenon ĉe Zoologia Parko apud Stonrivereto dum posttagmezo kaj vespero. Kun geamikoj ili sumigis deksepon da personoj. Tie ili manĝetis kaj paroladetis ĝis krepusko. Multaj vespoj ilin vizitis por partopreni en la sukeraĵoj. La verda stela standardo flirtis apud ili, kaj multaj pasantoj supozis ilin esti Irlandanoj.

Bopomano.

Digitized by Google

## GRAVAJ ŜTATDOKUMENTOJ
### DUA INAŬGURACIA PAROLADO
### de ABRAHAM LINCOLN
### 4 Marto, 1865

Sampatrujanoj:

Ĉe l' ĉi dua apero por fari la Prezidantan ĵuron, ekzistas por ampleksa parolado malpli granda bezono, ol unuafoje. Tiam ŝajnis konvene kaj dece, ke oni prezentu agadprogramon iom detalan. Sed nun, post kvar jaroj, dum kiuj konstante elvokiĝadis publikaj deklaroj pri ĉiu punkto kaj fazo de la granda barakto, kiu ankoraŭ absorbas kaj streĉas la nacion, malmulto nova estas raportebla.

Niaj batalprogresoj, de kiuj ĉio cetera pleje dependas, estas tiel konataj al la publiko kiel al mi mem, kaj ili estas, mi esperas, sufiĉe kontentigaj kaj kuraĝigaj por ĉiuj. Kvankam sangvina al la estonteco, mi ne riskas pri ĝi antaŭdirojn.

En la nunsimila okazo antaŭ kvar jaroj, ĉies pensoj maltrankvile rigardis al minacanta interna milito. Ĉiuj timis ĝin, ĉiuj penis eviti ĝin. Dum la inaŭguracia parolo estis farata el ĉi tiu loko, dediĉita absolute por savi la Union sen milito, ribelaj agentoj estis en la urbo, penante detrui ĝin sen milito—penante nuligi la Union kaj dividi la apartenaĵojn per traktado. Ambaŭ partioj mallaŭdis militon, sed unu el ili preferis fari militon, ol ke la nacio plu vivu, kaj la alia preferis akcepti militon ol ke ĝi pereu; kaj la milito venis. Okono de la tuta loĝantaro estis negraj sklavoj, ne distritaj ĝenerale tra la Unio, sed lokalizitaj en ĝia suda parto. Tiuj sklavoj formis specialan kaj potencan intereson. Ĉiuj sciis, ke tiu intereso iel estas la kaŭzo de la milito. Fortigi, vivteni kaj etendi tiun intereson—jen kial la ribelantoj volis rompi la Union per milito, dum la Registaro pretendis nur la rajton bridi ĝian teritorian pligrandiĝon.

Neniu partio atendis de la milito la amplekson aŭ la daŭradon, kiujn ĝi jam atingis. Neniu antaŭpensis, ke la kaŭzo de la konflikto eble ĉesos, eĉ antaŭ ol la konflikto mem ĉesos. Ĉiu esperis triumfon pli facilan kaj sekvon malpli fundamentan kaj miregigan.

Ambaŭ legas unu saman Biblion kaj preĝas al unu sama Dio, kaj ĉiu alvokas Lian helpon kontraŭ la alia. Povas ŝajni strange, ke homoj kuraĝus peti helpon de justa Dio, eldevigante sian panon el la ŝvito de aliaj vizaĝoj, sed ni ne juĝu, por ke ni ne estu juĝitaj. La preĝoj de ambaŭ ne povis ricevi plenumon. Nenies preĝo plenumiĝis perfekte. La Ĉiopova havas Siajn proprajn celojn. "Ve al la mondo pro faliloj! ĉar estas necese, ke venu faliloj, sed ve al tiu homo, per kiu la falilo venas!" Se supozi, ke la Usona sklavsistemo estas unu el tiuj faliloj, kiuj, laŭ la providenco de Dio, devis nepre veni, sed kiun, daŭrintan dum Lia difinita tempo, Li nun volas forigi, kaj ke Li donas al kaj

Digitized by Google · Original from PRINCETON UNIVERSITY

Nordo kaj Sudo tiun ĉi teruran militon kiel la punon por tiuj, per kiuj la falilo venis, ĉu ni konstatu en tio ian escepton el la Diaj atribuoj, kiujn la kredantoj al vivanta Dio ĉiam alskribas al Li? Forte ni esperas, fervore ni preĝas, ke tiu militplagego forpasu baldaŭ. Tamen se Dio volas, ke ĝi restu, ĝis elĉerpiĝos la tuta riĉaĵo amasigita per la ducent kvindek jaroj da senkompensa, sklava laboregado, kaj ĝis ĉiun guton da sango eligitan per skurĝo pagos alia guto eligita per glavo, do kiel oni diris antaŭ trimil jaroj, tiel ankoraŭ oni devas diri, ke la juĝoj de Dio estas veraj kaj ĉiuj estas justaj.

Kun malico al neniuj, kun indulgemo por ĉiuj, kun firmeco pri la bono laŭ tio, ke Dio vidigas al ni la bonon, ni penadu fini nian laboradon; bandaĝi la naciajn vundojn; zorgi pri tiu, kiu estos elbatalinta kaj pri ties vidvino kaj georfoj; fari ĉion, kio akiros kaj konservos justan kaj daŭrontan pacon inter ni mem kaj kun ĉiuj nacioj.

———o———

## LA ROKO APUD VOLGO

(Rusa Popola Legendo)

de N. Rudniki, Taŝkent, Centra Azio Rusa

Apud Volgo staras roko. Griz-verda, muskokovrita, dum centjaroj staras ĝi. La suprajo estas nuda: tie ventoj promenadas, kaj geagloj neston faras kaj viktimojn deŝiradas. Kaj neniam homa piedo vizitadas tiun rokon—malbenita ĝi do estas kaj ne sendanĝera. Sola homo nur vizitis la suprajon rokan. L' eklezio lin malbenis por eternaj tempoj, sed popolo vilaĝana male pensas pri la afero kaj la kantojn multajn verkis pri Stefano Rasin.

Unufoje, nokte, revenante hejmen, fiŝkaptista knabo Rasin supreniris la malbenitan rokon. Ne lin pereigis la malbonfama loko: sed ĝi flustris strangajn pensojn en la kapon lian.

Ekdecidis li subite, ke sufiĉe jam laboris por sinjoroj vilaĝano! For la sklaveco! Por li mem de nun li vivu!—diris la ribelulo. Baldaŭ li formigis aron da liberamuloj kaj ekgvidis la militon kontraŭ potenculoj. Revis li okupi Moskvon, reĝan tronon detruigi kaj popolon liberigi de sinjora premo. Ne sukcesis Stjenka Rasin, kaj ne helpis sangrivero la popoldoloron. Sinjoraro estis forta kaj ilin ne venkis sklavoj. Kaj en Moskvon venis Rasin—kiel arestito. En la kaĝo fera oni lin venigis. Turmentata kruelege finis vivon li.

Estas kredo ĉe popolo, ke se ekzistas en Ruslando iu homo senriproĉa, profitamon ne koninta, malfortulojn ne preminta, kaj amanta liberecon pli ol li amas sian propran vivon—iru li al tiu roko kaj li metu la orelon al la suprajo ŝtona—kaj la roko-grandegulo multe diros pri Stefano al ĉi tiu honestulo.

Digitized by Google
Original from PRINCETON UNIVERSITY

## LI ESTIS DEVIGA MORTIGANTO
de Geo. Lackey

Apud la vilaĝo J—a, en la verd-monta ŝtato, estas arbarego. Vojo trakuras ĝin tra la valo. Je ambaŭ flankoj de la vojo estas krutaj, malglataj montoj, sur kiuj loĝas multaj specoj da sovaĝaj bestoj.

Antaŭ kelkaj jaroj, unu viro piediris la vojon, kaj travivis teruran sperton.

Estis mez-nokto. Pezaj, nigraj nuboj plenigis la ĉielon, kaj ŝajnis ke baldaŭ estos pluvego.

La viro estis mezaĝa fortegulo—bravulo, preskaŭ giganto; kaj malgraŭ estis tiom mallume, li marŝis per fortaj paŝoj pensante ke li baldaŭ estos hejme.

Subite iu lin ekkaptis; li penis per sia tuta povo sin eltiri el la brakoj. Sed estis vane. Li baraktis, baraktadis, sed ne povis ĝin fari.

Bonŝance, li havis ĉastranĉilon: li ĝin eltiris el la ingo, kaj enpuŝis en la koron de lia atakanto, kiu falis teren mortvundite. Tiam li rapidis ĝis la plej proksima domo, vekis la anojn kaj diris ke li jus mortigis viron kiu lin atakegis.

Ili prenis lumigilon kaj kuniris kun li ĝis la loko kaj trovis—grandan mortintan urson.

———o———

## NIAJ ANGLAJ AMIKOJ
de Charles Dudley Warner

Tradukis Esopo

Turistoj en Svisujo povas ricevi amuzadon de la Angloj kiuj sursvarmas la landon; ili ŝajne konsideras ĝin ia privata parko aŭ konservajo kiu apartenas al Anglujo; kaj ili sin enŝovas en hotelojn, aŭ vaporŝipojn aŭ diliĝencojn kun certa mieno de posedado kiu estas tre agrable amuza. Geologio ne estas freŝa en mia menso, sed mi havas impreson ke Svisujo estis kreita speciale por la Angloj proksimume la jaron de **Magna Charta**, aŭ iom pli poste. La Germanoj kiuj venis ĉi tien, kaj kiuj ne estas senzorgaj kion ili manĝas, aŭ kie ili dormas, kondiĉe ke ili ne havu freŝan aeron en la manĝejo nek en la dormejo, plendas,—kaj speciale se la butero estas iomete ranca,—pri la Angloj, kaj protestas ke ili malbonigis Svisujon. Ankaŭ la enlandanoj kiuj ekzistas pere de la turistoj el Anglujo treege malamas ilin; tial oni ofte devas, por sindefendo deklari sian hejmlandon, kio estas preskaŭ same kiel kurado de **Scylla ĝis Charybdis**, ĉar, kvankam la Amerikano estas pli populara en Svisujo, la loĝantoj kredas ke lia poŝo ne havas fundon.

Digitized by Google   Original from HARVARD UNIVERSITY

Troviĝis juna ekleziulo de la Angla Eklezio sur la vaporŝipo sur Lago Lemano, kiu sin sternis sur meza benko, kaj paroladis instruege al siaj amikoj,—forta, grasvizaĝa junulo kun blanka kravato,—kies voĉo estis kaj laŭta kaj melodia, kaj kiun nia vireca Oksforda studento nomis viro kiu preskaŭ ne atingis sian gradon en la universitato, kaj havigis negravan eklezian oficon. "Ni renkontis Amerikanon sur la boato hieraŭ," la orakolo proklamis al siaj amikoj, "kiu estis ja efektive bona kunulo kaj agrabla ankaŭ. Li efektive estis, vi scias, reale prudenta homo. Mi demandis al li ĉu li havas ion komparan kun ĉi tio en Ameriko; kaj li devis diri ke en Ameriko ekzistas nenio tiel bela; reale, vi scias, tio estas fakto. Li ja estis tute prudenta kunulo. Li min informis ke li estas ĉi tie por fari la Eŭropan rondvojaĝon."

Rideto simpatia falis el la lipoj de la atenta, rigida, ruĝvizaga virino kiu sidis maldekstre de la orakolo, kaj ankaŭ subrido pri la Amerikano, el la maldika Anglo dekstre, kiu portis grandan blankan atlasan veŝton; bluan vualon ĉirkaŭ sia ĉapelo, kaj vizaĝon ruĝan kiel peco da brulanta karbo.

"Efektiva cedaĵo, ĉu ne?" li ridetis kun afabla aroganteco, "kaj de Amerikano, sed mi supozas ke ili ŝanĝiĝis de post sia interna milito, vi scias."

Baldaŭ la glata kaj radianta ekleziulo estis forlasita de siaj amikoj; kaj li eniris la kajuton, kie mi lin vidis sindoneme detenanta sin de la plezuro de la vidaĵoj, kaj konsolanta sin per granda manĝeto, kaj botelo da Angla biero. Bona eco de la Angloj eksterlande estas ilia preskaŭ senlima diverseco.

La plej bonaj konatuloj kiujn oni renkontas estas Angloj,—homoj prudentaj, kaj kun forta individueco; kaj oni povas havigi al si,. kviete, amuzadon rigardante la Anglojn de la alia speco.

Tre malsama al la pastro sur la boato estis la maljunulino ĉe **table d' hote** en unu el la hoteloj ĉe Lago Lemano. Oni ne arogas al si nomi ŝin ravege pekanta maljunulino, simila al Baronino Bernstein; sed ŝi havis sian propran spriton kaj satiran manieron pri sia opinio pri la mondo.

Si loĝis dum dudek kvin jaroj ĉe Genevo, kie homoj, antaŭ multaj jaroj, alveninte laŭ la pulvokovritaj kaj varmegaj vojoj de Francujo, ofte svenadis kiam ili havis sian unuan ekvidon de la Alpoj. Kredu min, ili ne faras tion nun. Ŝi neniam tion faris; ŝi jam pasigis la impreseblan aĝon kiam ŝi la unuan fojon vidis la Alpojn; la loĝantoj kaj homoj ŝin enuigis. Honestaj? Ho jes, sufiĉe honestaj, sed profitemaj. Bela Svisa ligna skulptaĵo? Jes, ĝi vin tedigos, ĝi estas tre beleta, sed ĝi min enuigas. Antaŭ jaroj, mi sendis iom da ĝi hejmen al parencoj en Anglujo. Ili tre admiris ĝin, kaj ĝi ne estis speciale bona, ĝi estis efektive malmultekosta. Moralaj ideoj? Mi havas nenian intereson pri moralaj ideoj: oni tro multe konsideras ilin nuntempe (ĉi tio estis respondoj al ŝia najbaro apuda,—stranga, malgrasa viro, kun maso da hararo, vilaj brovoj kaj alta falseta voĉo, kiu mo-

Digitized by Google

ketis la spritan maljunulinon pri ŝia manko de moralaj ideoj kaj kiu prave priskribis la maldensecon de la vino sur la tablo per la vorto "Akvo-sorĉita".) Kial la Baronino ne reiris al Anglujo se ŝin tiel tedas Svisujo?

Nu, nun ŝi estas tro malforta; kaj, cetere, ŝi timiĝas pri la vagonaroj, kaj estas tiom da novaj elpensajoj nuntempe pri kiuj ŝi legis. Kio estas tiu ĉi nova dinamito, kiu eksplodas tiel terure? Ne: ŝi decidis resti kie ŝi estas.

Oni facile rekonas la Anglon, kun lia familio aŭ sen ĝi, kiu intencas viziti Svisujon. Li ĉiam portas botelon da brando, vidilon, kaj tornistron. Ĉu li havas silkan aŭ feltan ĉapelon, li certe ĉirkaŭvolvas ĝin per vualaĵo. Ĉi tian antaŭzorgon li faris kiam li decidas veni al Svisujo, mi opinias, ĉar li kompreneble legis ke vualo estas necesa por ŝirmi la okulojn kontraŭ neĝa lumego. Ne unu turisto el cent kiuj eble sin trovas inter la amasoj da neĝo kaj glacio iam bezonas vualon aŭ verdajn okulvitrojn: sed estas saĝe havi ĝin sur la ĉapelo; ĝi aspektas aventurema. La vualo kaj alpa bastono estas signoj de danĝero. Ĉiu homo—preskaŭ ĉiu—kiu vizitas Svisujon havas alpan bastonon, ĝi estas spektakla; ĝi estas impona al la aliaj vizitantoj.

Antaŭ nelonge mi vidis sur la vaporŝipo noblan junan Briton kiu portis vestaĵon laŭ la plej bona alpa modo. Li portis mallongan sakpalton—fakte, plenvestaron el hela griza flanelo kiu alteniĝis al lia fleksebla formo. Liaj ŝuoj estis faritaj el nekuirita ledo, kun grandaj najloj en la plandoj, kaj sur la blanka ĉapelo li portis grandan kvanton da gazo kiu falis en faldaĵoj malsupren laŭ lia kolo. Mi bedaŭras diri ke li havis vizaĝon ruĝan, razitan mentonon, kaj longajn flankajn vangharojn. Li portis timigan alpan bastonon; kaj ĉe eta albordiĝejo kie ni unue lin vidis, kaj poste sur la boato, li sin apogis sur ĝi en serioj de la plej graciaj kaj kuraĝaj pozoj kiujn mi iam vidis ĉe la homa formo.

Nia Oksforda studento tre bone konis la specon, kaj prave divenis ke li apartenas al la armeo. "Ĉu li iam estis super la **Gemmi**? aŭ ĉu li iris al la supro de ĉi tiu aŭ tiu monto?" demandis alia Angla oficiro. "Ne, mi ne iris tien."

Ni poste lernis ke li nenien iris, kaj verŝajne li ne intencis fari ion alian ol montri sin antaŭ la vizitantoj de la valaj hoteloj, kaj tamen, mi tre admiris lian bonan sintenadon. Poste ni lin vidis ĉe **Interlaken**, elportanta ĉiom de la malagrablajoj de tiu moda ripozejo.

Troviĝis ankaŭ alia el la sama lando vestita por la plej danĝera alpa suprenrampado, vidindaĵo en siaj ruĝaj ŝtrumpoj el lano kiuj atingis ĝis super la genuoj. Oni ne min informis ke li iam suprenrampis ion pli altan ol la supro de diliĝenco.

Digitized by Google   Original from PRINCETON UNIVERSITY